Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 15-an de junio 2023 per Zoom

Ĉeestis
Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 27-an de aprilo 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Laborformo de la estraro
En landa kunveno preskaŭ ĉiuj estraranoj reelektiĝis por nova periodo. En la nova periodo la estraro plulaboros proksimume en la sama maniero kiel en la antaŭa.

4. Kontakto kun la membroj
Ni decidis kontakti la klubojn por peti retadresojn de ĉiuj klubaj membroj. La reston de la membroj ni provu atingi per sms kaj, eventuale, per telefonalvokoj.

Ni deziras uzi la retadresojn interalie por dissendi novaĵleterojn kaj ĝeneralajn informojn pri la Esperanto-movado.

Ni notas la regulojn de Datatilsynet pri havigo de aktiva konsento de la membroj pri uzo de iliaj retadresoj.

5. Reteno de membroj
Ni intencas sendi leterojn retpoŝte aŭ koverte por provi pagigi tiujn, kiuj ankoraŭ ne pagis por 2023 kaj estos konsideritaj nemembroj se ili ne pagos ĝis la fino de la jaro.

6. Eksiĝo de Studieorganisasjonen *Næring og samfunn*?
Pro manko de kursoj ni decidis ne plu membri en la studorganizo *Næring og samfunn*, krom se antaŭ la paglimdato venos informoj, montrantaj klaran utilon de tia membreco.

7. Statuta reviziado
La akcepto de la statutŝanĝoj dum la landa kunveno okazis en bokmål. Ni devas traduki la ŝanĝojn en Esperanton kaj nynorsk kaj afiŝi la novajn versiojn de la statuto en la retejo. Jardar faros la necesajn lingvajn ŝanĝojn kaj tradukojn. Kontrolos Bård.

8. Esperantonia
Ni atendas ricevi oficialan reagon de la klubo de Oslo al letero koncerne altigon de ilia jara pagparto por Esperantonio.

9. Eventualaĵoj
Neniu.

10. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 24-an de aŭgusto je 20.00 aŭ 20.30.

Protokolis Marianne Lund